6-a JARO, N-o 309



LEIPZIG, 4. / 9. 1930

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

SKLAVECO ĈE LA ANTIKVULOJ

La institucio de l' sklaveco estas same malnova kiel la antikva socio mem. Ĝi reiras ĝis la epoko, en kiu la primitivaj grupiĝoj, forlasante sian nomadan vivon, komencis fiksiĝi sur la grundo, k transiris de la bredado de brutaroj al la terkulturo, kiel ĉefa maniero de materia vivteno. Ĝi ekzistis nek ĉe la primitivaj popoloj, kiuj vivis el la ĉasproduktoj k fiŝkaptado, nek ĉe la paŝtistaj triboj, aŭ ĝi ne estus havinta kaŭzon esti. Ĝi ekaperis nur en difinita evolustato de l' primitivaj socioj, postulante labordividon sufiĉe progresintan. La sklaveco, kiel difinita formo de l' socia labordivido, anstataŭis k aldoniĝis la malnovan labordividon inter viroj k virinoj.

La sklavoj apartenis plene al siaj mastroj, kiuj povis fari kun ili, kion ili volis. Ili estis ilia propraĵo, objekto, tute kiel ilia bovino k ilia kampo. Ili ne havis civilan aŭ juran personecon k ĝuis neniajn rajtojn apartenantajn al la ceteraj membroj de l' socio.

Komence, ilia situacio ne estis tro peniga. Okupite ekzkluzive pri domlaboroj, vivante en la hejmo de l' mastro, manĝante ĉe lia tablo k sekvante lin en ĉiuj cirkonstancoj de lia vivo, ili estis konsiderataj kiel partoprenantoj je la familio k traktataj kun mildo. Kvankam teorie ili estis la propraĵo de l' mastro, la leĝo malpermesis tamen ilin malbontrakti, k punis severe, kelkfoje eĉ per la mortpuno, la mortigon al sklavo fare de lia mastro.

Sed dum la paso de l' tempoj, ilia situacio pligraviĝis konsiderinde. Komence, ni ĝin vidis, ili estis okupataj ekskluzive pri domlaboroj, kie ili restis en konstanta kontakto kun siaj mastroj, kies ekziston ili partoprenis. Sed iom post iom, kun la disvolviĝo de l' metia industrio, oni okupis ilin ankaŭ en industriaj laboroj, kie ili faris konkuron al la libera laboro. Fine, kiam la militoj, daŭrantaj sen halto, malebligis al la malgrandaj terkulturistoj ekspluati siajn kampojn, k kiam ĉi tiuj iris iom post iom en la manojn de malgranda nombro el



Grubbe — Kapo de laboristo

grandaj bienposedantoj, regantaj super vastaj ter-etendaĵoj *(latifundia)*, la sklavoj estis okupataj amase ĉe kamplaboroj, de kie ilia konkurado forpuŝis preskaŭ komplete la liberan laboron. Ilia laboro estis preferata al la libera laboro, ĉar ĝi estis malpli kosta k ĉar la sklavoj ne estis devigitaj militservi. La sklavlaboro estis tiom avantaĝa, ke ĝi disvolvis baldaŭ vastan sklavokomercon, protektitan per la leĝo k subtenitan per la kontinuaj militoj k per veraj ĉasadoj je la homo, entreprenoj kun la ekskluziva celo havigi al si sklavojn. La venkitaj loĝantaroj estis entute forkondukataj en kaptitecon k vendataj aŭkcie sur la multnombraj sklavofoiroj, kiujn nombris la antikveco. Ili estis tiom multnombraj, ke en iuj lokoj ilia nombro estis pli ol dekoble pli supera al tiu de l' liberaj civitanoj. En Romo speciale, kie la sklaveco atingis sian plej altan disvolviĝon, la daŭre de la Romana Senato entreprenitaj militoj k la submeto de tutaj loĝantaroj sub la Roman Respublikon, poste sub la Imperion, alfluigis en la urbon mem k en la tutan duoninsulon grandegajn sklavamasojn.

Ilia situacio estis, kun la tempo, fariĝinta en plej alta grado mizerega. Konsiderataj, ne kiel personoj, sed kiel objektoj, parolantaj instrumentoj, kontraste al la bestoj, kiuj estis neparolantaj instrumentoj, iliaj mastroj povis ilin malbontrakti aŭ mortigi, laŭ sia bona plaĉo. Oni eĉ akceptis en Romo la kutimon signi ilin per la instrumento, per kiu oni ilin batis kutime, k de kiu iliaj dorsoj k iliaj membroj portis la videblajn markojn. Ili ne povis edziĝi, sed nur vivi konkubine (neleĝe) kun sklavino, k ankoraŭ nur kun la permeso de siaj mastroj. Kato la pli aĝa praktikis mem kun ili tre apartan finegocon. Li prostituis ilin por difinita sumo da mono, malpermesante al ili ĉiujn seksajn interrilatojn inter si. Li devigis ilin labori la tutan tempon, dum kiu ili ne dormis, k konsentis al ili por la dormo la tempon nepre necesan por teni la maŝinon en stato de funkciado. Kiam ili estis maljuniĝintaj k malkapablaj labori, li vendis ilin kun la malnova feraĵo. Fine, la sklavoj nenion povis posedi kiel propron, k ĉio, kion ili laborakiris, kiam ili praktikis sendependan metion, apartenis al iliaj mastroj.

Kiom malproksima oni estis de la patriarkaj interrilatoj el la primitivaj

tempoj! Devigitaj labori en katenoj de l' krepusko ĝis la nokto, sub la gardo de submastroj armitaj per longaj vipoj, per kiuj ili frapis ilin senkompate ĉe la plej malgranda malstreĉiĝo en la laboro, mizere nutritaj, iafoje stampitaj per fajro, aŭ la kapo duone tondita, por ke ili ne povu forkuri, malvaste enfermitaj dum la nokto en teruraj kabanaĉoj, aŭ en subterejoj heligitaj per malvastaj fenestroj, kien iliaj manoj ne ĝisatingis, kruele punitaj pro la plej malgranda eraro, ili estis traktitaj kiel brutaĉo. Ĉiu forkurprovo estis punata per la mortpuno per krucumo.

Kien ili povus iri cetere? Tiuj forkurprovoj havis tre malmulte da sukcesoŝancoj, ili estis agoj de malespero, kiuj finiĝis nevarie je la sama maniero.

Kiam ili estis arestitaj k rekondukitaj al siaj mastroj, tre malofte oni kontentiĝis sin pri tio ilin brulstampi, ĉu sur la manoj aŭ piedoj, ĉu sur la frunto, vinkti al ili sur la kolon punringon, kiu portis enskribon, kvazaŭ hundo-kolringon, k ilin sendi al laboro en minejoj aŭ ŝtonrompejoj. Dum la plej granda parto de l' tempo oni liveris ilin al la bestoj aŭ oni ekzekutis ilin per plej malbonaj turmentoj. Tiu ĉi ekzekuto okazis ordinare per la krucumo. La kondamnito, portante sur siaj ŝultroj la *patibulum*, pezan pecon da ligno, kiun oni ingigis al li sur la nukon, estis kondukata per vergo- k bastonbatoj ĝis la ekzekutejo. Tie oni fiksis la *patibulum* al fosto, k la malfeliĉulo estis najlata per la manoj al la du branĉoj de l' *patibulum* k per la piedoj al la fosto. Iiafoje, tamen, oni variis la ekzekutmanieron. Oni ĵetis la kondamniton en fornon, kie oni lin vivbruligis, ŝmirinte lin per peĉo. Kiam mortigo estis farita kontraŭ la persono de sklavposedanto k oni ne konis ĝian aŭtoron, ĉiuj sklavoj estis konsiderataj kiel solidare respondaj pri tiu mortigo k estis ekzekutataj.

La sklavoj, kiuj laboris en la muelejoj, estis la multe plej malfeliĉaj. Kovritaj de senformaj ĉifonoj, la frunto stampita, la kapo duone razita, la piedoj premitaj en fera ringo, la kolo enfermita en speco de punjugo por malhelpi ilin porti la manon al sia buŝo k gusti la farunon, kiun ili fabrikis, — ili vivis en atmosfero de fumo k malluma vaporo, kiu lasis al ili apenaŭ la uzon de l' okuloj.

Tia estis la situacio de l' sklavoj en la epoko de l' apogeo de la antikva socio. Kaj oni komprenas de tiam la maldolĉan vorton de Momzen *(Mommsen)*: "Sondu, kiu volas, la profundojn de tiu ĉi maro el doloroj k el mizero, sufiĉas ekrigardo sur la kondiĉon de tiuj ĉi plej malsuperaj k plej malfeliĉaj inter la proletoj por aserti tuj, sen timo esti kontraŭdirata, ke la negroj nur havas por trinki guton el la kaliko, kompare kun la doloroj suferitaj de la romaj sklavoj."

*M. Olivje (Ollivier).**
Tradukis N. B.

* Eltiraĵo el libro "Spartako" *(Spartacus)*, franclingva (eld. *l' Epi*).

LA KARBMINISTARO EN BELGIO

Ĉiuj scias pri la longdaŭra krizo okazanta en la karbindustrio tutmonda. Speciale en Britio ĝi estas akra, k centmiloj da ministoj estas senlaboraj. La ministraro de Mkdonald (Mac Donald) tute sensukcese provis malpliigi la nombron da senlaboruloj. En aliaj landoj la krizo ankaŭ etendiĝis. Sed ĝis nun, iuj landoj sukcesis malebligi aŭ prokrasti la krizon. Ekzemplo: Belgio. Ĝis 1928 tiu favora situacio estis facile klarigebla. La malplivaloriĝo de la belga mono ebligis eksporton grandkvantan. Sed de tiam, la mono estas stabiligita k la prezoj fariĝis samaj preskaŭ en ĉiuj landoj produktantaj. Krom tiu subita foriĝo de la favora monsituacio, la belga industrio estas malfavorita per la ofte malmoderna ilaro, per la malriĉa vejnaro, per la tre multekostaj trabaĵoj subtenaj.

La plej granda parto el la belgaj basenoj estas jam profunde elĉerpita (La ek-ekspluatado je la minkarbo datumas por la Lieĝa (Liège-a) regiono de la jaro 1213 k por la regiono de Ŝarlrŭa (Charleroi) de la jaro 1600. Estas do fakto: la karbo logike devus kosti pli en Belgio ol en Britio. Kaj ni konstatas, post studo de la oficialaj nombroj publikigitaj de la "Revue Internationale du Travail" (Internacia Revuo de l' Laboro), ke la kostoj de l' karbo estas proksimume samaj, ĉu en Belgio, ĉu en Britio, ĉu en Francio. Nur Ĉeĥoslovakio k Polio sukcesas malplialtigi la kostojn. Tiuj du lastaj landoj estas unuflanke tre bone favorataj per novaj minejoj k en Polio per tute mizeraj salajroj. La ĉefa faktoro estiganta la prezon de l' karbo estas certe la salajro, do la nombroj ĉi sube citotaj montras, kiom kostas *salajre milkilogramo* da karbo:

en Polio	5,53	orfrankojn
„ Ĉeĥoslovakio	9,43	„
„ Sar-teritorio	14,23	„
„ Britio	14,29	„
„ Francio	14,47	„
„ Belgio	14,85	„

La eta diferenco inter la aliaj landoj, Britio, Francio, Saro k Belgio estas larĝe kompensita per la tre trafa situacio geografia de Belgio, la transportfaciloj k ankaŭ per la taŭga kvalito de la belga karbo.

Do, malgraŭ ĉiuj malhelpoj supre cititaj, la situacio de la belga karbindustrio restas favora. Kiel do? Nur sola faktoro povas klarigi tiun nenormalaĵon: la malaltaj salajroj. Denove la Internacia Revuo de l' Laboro instruas nin tiusence, k jen la konkludaj nombroj entenataj en la ĝenerala raporto:

Konsiderante la nombron 100 kiel bazon, ni kalkulas, ke la diversnaciaj salajroj estas jenaj:

en Brita	karbminejo	laboristo	ricevas	100
„ Rura (Germ.)	„	„	„	89
„ Sara	„	„	„	65
„ Franca	„	„	„	54
„ Nederlanda	„	„	„	84
„ Ĉeĥoslovaka	„	„	„	56
„ Belga	„	„	„	47

Do, brita ministo ricevas pli ol duoblan salajron rilate al la laboristo je la servo de la belga karbindustrio. Efektive, ni ne povas tiom malkomplete informi la legantaron k prikrii la mizeron de la belga ministo rilate al la alinaciaj ministoj. Ni devas ankaŭ konsideri la vivkostojn, alivorte la aĉetkapablon de la koncernataj laboristoj. Tiam ni konstatu, ke en Belgio, laŭ orfrankoj, la vivo estas je 21% pli malmultekosta ol en Britio. La nombroj, laŭ la aĉetpovo, estas do:

Ministo en Belgio povas vivi laŭ la bazo: 100, dum ministo en Britio nun povas vivi laŭ la bazo: 68.

Konklude: la belga kapitalistaro ne suferis pro la ĝenerala krizo dank' al sola faktoro: la malbonaj vivkondiĉoj de la laboristoj.

* * *

En artikolo aperonta post kelka tempo mi detale pritraktos la batalon de la laboristaro por akiri pli konvenajn vivkondiĉojn; mi do ne tuŝos hodiaŭ tiun flankon de la problemo. Mi tamen volas sciigi, ke la ministaro estas tiu parto de la belga proletaro, kiu estas la plej bone organizita k kies postuloj estas pleje konsiderataj de la kapitalistaro. La leganto mem komprenos, ke se la situacio de la belga ministo estas tiom malbona, la situacio de la aliprofesiaj laboristoj estas eĉ pli terura.

La statistikoj montras ankaŭ al ni, ke okazas en Belgio plej multnombraj laborakcidentoj (en la karbindustrio). Speciale lastatempe pluraj katastrofoj estiĝis, kiuj kaŭzis la morton de multaj laboristoj. La lasta katastrofo okazis la 8-an de marto en Marsinel (Marcinelle). La mingasa eksplodo mortigis 15 laboristojn.

Enlandaj laboristoj por la minejoj fariĝas pli k pli netroveblaj. La patroj konsilas al siaj filoj alian metion, ne tiom mortigan. En la belgiaj basenoj laboras multaj eksterlandanoj k ĉefe

laboristoj venintaj el landoj, kie la blanka teroro regas. Multaj poloj, italoj, alĝerianoj, marokanoj laboras en la minejoj. La sekvanta listo montras laŭnacie la mortintojn okaze de la katastrofo de la 8-a de marto: 4 belgoj, 1 nederlandano, 7 poloj, 2 marokanoj k 1 italo. Tio ilustras la diversnaciecon de la laboristaro okupita *en la belgaj* karbminejoj.

Tiele aspektas la situacio de la ministo en lando, alnomata de fama socialista teoriisto: "La Paradizo de la Kapitalistaro." *Leono Bergiers (630).*

SARDUJO

SAT-ano 15973

(Daŭrigo. Vidu n-on 305/6)

Terkulturo

La prisemado okazas sen grasigi la teron, ĉar grasigaĵon oni tute ne konas. Por ke la tero estu ĉiam fruktodona, oni prisemas ĝin nur du sinsekvajn jarojn k la du sekvantajn jarojn oni lasas ĝin kiel paŝtherbejon. Kutime la kamparanoj dum du jaroj sinsekvaj prisemas la ĉirkaŭantan kamparon de la vilaĝo k dum la du sekvantaj jaroj ili prisemas la kamparon lokitan pli malproksime. Dum la prisemado en ĉi du lastaj jaroj ili dormas en grotoj sur la kamparo mem, ĉar la tro granda malproksimo ne permesas al ili reveni hejmen ĉiutage. Nur ĉiusabate vespere ili revenas al la vilaĝo por iri al la preĝejo la sekvantan tagon, kiu estas dimanĉo: tio estas tre severa ordono de la vilaĝa pastro. Dum la restado sur la kamparo ili nutras sin per seka pano k fromaĝo k trinkas akvon el la riveretoj.

Meze de junio oni komencas falĉadi la grenkreskaĵon per grenkurbtranĉilo, ĉar falĉmaŝinojn oni tute ne konas. Poste per kamparveturilo oni transportas la falĉitan grenkreskaĵon al ia ronda terpeceto, intence k oportune ebenigita. Kiam la grenamaso estas sufiĉe sekigita de la varmegaj sunradioj, oni turnigas sur la grenamaso parojn da bovoj aŭ bovinoj jungitaj, trenantaj ian longforman multepezan ŝtonon, ligitan al la jungilo per ŝnuro aŭ ĉeno. Tia turnirado daŭras, ĝis la grenfojno preskaŭ pulvoriĝis k la grajnoj tute eliris el la spikoj. Poste per ligna ilo triforka la kamparanoj eklevas alten svingante la pulvorigitan pajlon, tiel ke la vento forportas ĝin k la grajnoj senŝeligitaj refalas vertikale. En la sekvo oni refaras la saman laboron per ligna ŝovelilo helpate de balailo, ĝis estos de pajleroj tute purigita la grajnamaso. Jen, kiel en Sardujo oni kutimas draŝi la grenaĵon pro foresto de draŝmaŝinoj. Kompreneble en la ebena parto de la insulo estas eĉ tre riĉaj terposedantoj, kiuj posedas terkulturajn maŝinojn, sed la granda plimulto el la insula loĝantaro tute ne konas ilin.

Vinberujoj konsistigas apartan riĉon de Sardujo. Fruktoj ĉiaspecaj tie eĉ abundas, k ĉasaĵo estas grandkvanta. Multaj personoj okupas sin pri fiŝkaptado. Sed la komercaj aferoj estas ĉiam iom riskaj, ĉar la transportrimedoj, pro nesufiĉaj relvojoj tra la insulo, estas tre multekostaj.

Fakte en Sardujo krom la rekta fervojlinio de Kagliari *(Cagliari)* ĝis Terranova estas nur du mallongaj (eble sume 50 kilometrojn longaj) fervojlinioj. Certe kondukas ankaŭ tra la norda parto de l' insulo fervojlinio, sed por malgranda lokomotivo, kiu fortrenas nur du aŭ tri vagonetojn.

Sardaj transportrimedoj kaj kamparana vivo

Artefaritaj larĝaj vojoj, precipe en la centra k norda partoj de la insulo estas malmultaj. Tial la sardaj kamparanoj estas tre bone kutimitaj trairi la malebenan kamparon sur mallarĝaj k malbonegaj vojetoj, grimpante kvazaŭ kaproj. Ofte oni povas vidi kamparanojn sur kampoveturiloj, trenataj de bovoparo jungitaj per ia jungilo ligita ĉe la bazo de la kornoj, suprenrampi sur malbonaj vojetoj, tra sovaĝaj arbetaroj, kvazaŭ katoj la ŝtonoplenajn k malebenajn deklivojn de la montoj. Ili iras por alporti sekan lignon brulan, ĉu por sia familia provizo, ĉu por vendi, ĉar dum la tuta jaro la sardaj familioj, pro sia tute malmoderna hejtsistemo, bezonas multe da brulligno. Por hejti la ĉambron, tie oni ne uzas fornon, escepte riĉuloj k eĉ ne ĉiuj.

Ja enirante ĉe preskaŭ ĉiu sarda malriĉa domo oni ricevas la impreson, samkiel se oni enirus en la infero priskribita de la pastroj: ĝi estas teretaĝa; la muroj estas nigraj, kvazaŭ ili estus konstruitaj el karbo; meze de la ĉambro kuŝas amaseto da malseka ligno brulanta, el kiu seninterrompe eliĝas densa fumo. Ĉe la tegmento subtenata de kelkaj dikaj k maldikaj tre malnovaj lignotraboj, intence tiel aranĝitaj, ke la fumo povu eliri, estas milo da truoj. Super la brulanta k fumanta amaseto da ligno pendas, subtenata per kvar nigraj ŝnurpecoj, ia krado el ligno por sekigi fromaĝon. Ĉe unu angulo estas ŝtona forno, en kiu la mastrumantino ĉiusabate bakas la panon necesan por la familio dum la tuta semajno. Sub la forno estas porka dometo, el kie de tempo al tempo gruntanta porko elŝovas la kapon por rigardi, ĉu la dommastrino ankoraŭ ne foriris. Kiam la okazo estas favora, ĝi eliras el sia dometo, renversas kaldronojn, kafokruĉojn k ĉion, kio troviĝas sur ĝia trapasejo.

En alia anguleto estas kokinejo k apud ĝi kuŝas longforma ŝtono, sur kiu staras akvujo. Parton de la ĉambro okupas iu tre malnov-sistema azen-muelilo, t. e. muelilo funkciigata de azeno, kiu, jungita per ia ligna jungilo k maskita per ĉifonturko, ĉirkaŭiradas ĝin por mueli la familian tritik-provizon. Sed nuntempe ankaŭ en Sardujo estas kelkaj vent-, akvo- k elektro-muelejoj.

La dommastrino de tempo al tempo, kolerigita k blasfemanta, forpelas la ruzajn kokinojn, kiuj post nelonge obstine revenas k kaptas ĉiun favoran okazon por eksalti ĉu sur la knedujon, ĉu sur la farun- aŭ grenkorbon, disetendante la flugilojn por ekvilibre stari avidege bekante tiel ke per sia malatento, precipe per la piedoj, ili disŝutas la grenon sur la planko.

(Daŭrigota.)

ĈU VI JAM PENSIS PRI TIO,

ke multaj sovetiaj abonantoj al „S-ulo" ne plu povos ricevi nian gazeton post finiĝo de sia abono kuranta?

Montru vian solidaran senton!

Helpu al sovetia K-do

daŭrigi sian abonon, pagante por li la abonmonon, ĝis la normalaj monrilatoj kun Sovetio restariĝis, — al la

Administracio en Leipzig!

IOM PRI LA VIVO DE SENLABORULO

Senlaboreco — ne plu maloftaĵo en la malbenita kapitalisma sociordo. Ankaŭ mi jam 10 monatojn estas "benata" per tiu fistato. Sed mi ne estas libervola senlaborulo glutanta senlaboran enspezaron — rentumon, alie dirite: mi ne estas kapitalisto, sed mi estas viktimo de la kapitalisma ekonomio — nelibervola senlaborulo, alivorte laborserĉanto. Jam ĉirkaŭe 300 tagojn mi estas tia ulo, ĉiulunde k ĉiumerkrede prezentanta min ĉe la senlaborula oficejo kun "stampokarto" (porkontrola), kie stampaĵo estas enpresata montranta, ke mi ĉeestis. Ĉiuvendrede mi ankaŭ tien iras por ricevi de tiu oficejo la subvencion tro malsufiĉan por povi vivi, sed tro multan por mortaĉi. Nun ĉar hazarde mia patro ricevis laboron, mi eĉ ne plu ricevas tiun tielnomatan "krizo-subvencion", sed anstataŭ mono mi ricevis antaŭ 3 semajnoj nur slipon, sur kiu estis skribita: "La pagado de krizo-subvencio nun devas ĉesi, *ĉar ne plu ekzistas bezono*". Do mi kiel 22-jarulo nun devas esti subtenata de mia 57-jara patro. Ĉu tio ne estas hont-

inda por mi, kiu havas kapablon k forton por labori k estas subvenciata de mia sufiĉe aĝa patro? Sed kiel aliigi tiun staton, se la kara "patro" ŝtato ne permesas tion?

"Kiel vi nun pasigas vian multan tempon, ĉu vi ne enuas?" certe multaj demandos k jam demandis min. Al tiuj mi koncize diru la sekvanton: Mi dum mia tuta ĝisnuna senlabora tempo neniam ankoraŭ enuis, ĉar ĉiam mi estas okupita pri miaj aferoj. Mi preskaŭ ĉiam aŭ legas aŭ skribas, do plej ofte estas studanta, k nun mi bone povas eluzi mian sufiĉe grandan libraron. Dum belega somervetero mi kompreneble iras en arbaron, min kaŝante ien (ĉar la leĝo malpermesas nudon sur malkaŝaj lokoj) k demetas ĉiujn kulturĉifonojn k sunbanas min, sed ankaŭ irante tien mi neniam forgesas iun legaĵon. Ŝajnas al mi, ke la plej bona, kion povas fari senlaborulo, estas studadi. Ni kiel revoluciaj senlaboruloj devas eluzi nian senlaboran tempon por funde lerni la esencon de l' kapitalisma mastrumado, ekkoni la diversajn kontraŭkapitalismajn doktrinojn k eltrovi la ireblan vojon al nia libero. Ni ne nur devas insulti pri la fisociordo k montri la pugnon al niaj malamikoj, sed ni nepre devas unue tute objektive k profunde rigardi la kapitalismon k socialismojn. Mi asertas, ke la diseco inter la klaskonscia laboristaro nur devenas de tio, ke la membroj de la multaj diversaj kontraŭkapitalistaj organizoj k partioj ne agis laŭ tiu de mi supre dirita frazo.

Do mia ĉefa okupado dum senlaboreco estas sanigi miajn korpon k spiriton. Dum vesperaj horoj mi plej ofte estas survoje por laborista k esperanta movadoj, gvidas esp. kurson ĉe infanoj ĉi tieaj, kunlaboras en esp. studrondeto k grupo, vizitas kunvenojn de proleta junularo, iras al sportejo por sanigi mian korpon sportante k gimnastikante, vizitas diversajn aliajn kunvenojn k tiel pasigas la vesperojn. La dimanĉojn mi ĉiam uzas por ekskursi en nian montaron aŭ por sunbani kun miaj geamikoj. Tiel mi kiel senlaborulo pasigas miajn tagojn, ĉiam esperante baldaŭ ricevi laboron, k ĉiam batalante kontraŭ la kapitalismo kun ĝia absurda monsistemo, kiu ĉefe kaŭzas la senlaborecon.

Mia alvoko al la tutmonda senlaborularo estas: Studu la ekonomion, trovu la batalilon por forigi la senlaborecon, batalu neniam laciĝante, ĝis la kapitalismo estos venkita k la lasta senlaborulo estos envicigita en la produktado. Batalu, amikoj! La venko devas esti nia. *SAT-ano 6707, Germanio.*

Nur tiam vi rajtas paroli pri sukceso, kiam el via kurso rezultas aliĝoj por SAT kaj abonoj por "S-ulo".

AKTIVA HELPO ESTAS NECESA!

PENSOJ DE MALLIBERULO

Kie — —? mi ne vidas akcidenton — vunditan homfraton. — — Jes, kara K-do, eble momente viaj okuloj serĉas vane tian homon kompatindan; tamen ne pasas eĉ unu minuto, dum kiu ne aŭdiĝas dolorkriegoj. Ĉiutage la gazetaro prezentas al sia legantaro tutpaĝajn raportojn pri akcidentoj diversspecaj — sed krom tio, vole, nevole al niaj oreloj sonas alvokoj, kiuj sufiĉe kompreneble esprimas egajn animajn dolorojn. Estas helpvokoj el alia mondo. "Ne forgesu nin, Gek-doj! studu iomete pli detale nian aferon — poste, vi havos alian opinion pri ni — pripensu, ke la venonta tago jam povos ŝanĝi vian iradon."

Kien ni turnu nin kiel malfeliĉigitaj, se vi malestimeme montradas al ni la dorsflankon. Ni estas tamen viaj K-doj, kiuj batalis — bataladas — ŝultro ĉe ŝultro kontraŭ la saman malamikon. Ni perdis la rektan vojon, serĉis vane vojomontrilon — ĉie ni trovis ŝlositajn pordojn — fermitajn korojn. Tro malmulte klerigita — antaŭokule la certa perdiĝo — senpripense oni tiamomente demetas la nomon "homo" — kiel malsata besto oni rabas — por satigi la ribelantan stomakon. Baldaŭ la "sankta justeco" sukcesas enkapti la fihomon (pli bone "beston") k enkaĝigas lin longjare. La cetera homaro ne pli profunde esploras la kaŭzon de lia fi-ago — li nur estas proleto — nepre eĉ denaske "krimulo".

Sed la tempo antaŭeniras — ankaŭ la pensado inter la subprematoj pli maturiĝas. Post sia puntempo, kelkaj K-doj trovis kuraĝon publikigi "la travivaĵon malantaŭ muroj". Dank' al tio oni postulos pli homindan traktadon al la K-doj malliberigitaj. Nur tiel per racia helpo oni atingos bonajn rezultojn. Ĉie blovas nova vento — ĉien — ankaŭ al ni — tra la dikaj muroj iras la forta voko. Pli multe da suno! — por ke la koroj revarmiĝu. Montru al ni novajn vojojn! For ĉiujn antaŭjuĝojn — estas viaj fratoj — fratinoj, kiuj pasigas siajn plej bonajn jarojn malantaŭ muroj. Antaŭ ĉio — helpadu laŭpove ĉie k kie vi vidas suferon — mizeron. Pli k pli konscie ni devas sekvi la alvokon de Karlo Marks pri la unuiĝo de l' ĉiulandaj proletoj. Certe antaŭ liaj okuloj staris la terura sorto de l' homfratoj vive entombigitaj, kiam li verkis la famajn finvortojn de l' "Komunista Manifesto" . . .

La ora kaĝego

Vilhelmo la II komence de l' mondbuĉega festo diris al sia regataro: "Mi kondukos vin al ora epoko!" Tre ofte mi pripensas tiun parolaĉon. Certe ambaŭparte tiuj gloraj vortoj plenumiĝas. Nia brava eksmilitestro nuntempe estas posedanto de ora trezoro — dum ni . . . etaj pekuloj . . . diboĉas en ora kaĝego. Estas konata proverbo: etulojn oni pendigas k al la amasmurdistoj oni elkore deziras pluajn progresojn. Eble unu aŭ la alia ne plene konsentos al ĉi tiuj vortoj; sed pripensu iomete la ĉiutagajn okazojn — baldaŭ vi konstatos, ke mi pravas. "Ĉiu sperta komercisto faras duoblan libro-tenadon."

La dekreto pri la nuntempa punmetodo ordonas (surpapere) eduki el fi-homoj bravulojn; vere — ne mankas la t. n. bona volo — sed estas tre longa vojo de supre ĝis malsupre. La Vilhelmstrataj[1] ordonoj iĝas pli k pli kriplaj, ĝis ili fine atingas la celatan objekton. La klerigita malliberulo batalas ĉiaman batalon, ĉiuflanke — putraĵoj baras la progresan vojon. Granda parto el la gardistaro tute ne kapablas imagi al si la vivbatalon de l' proletaro. Por ili la laborista klaso ne ekzistas, k tial ili evitas ĉian proksimiĝon al ĝi. Treege ili resopiras la bonan, malnovan epokon. Se oni, pro prudento, konsentas al ilia parolaĉo, ĉiam oni aŭdas ilian ripetiĝantan plendon: "Ha jes, nia iama glorriĉa tempo — kien ĝi forpasis! Tiame la uniformvestito estis estimata persono — sed hodiaŭ — sensukcese oni postulas respekton. Eĉ la hundaro — —"

(Finota.) *H. H., Germanio.*

POR NIA DISTRO

Reklamo

Antaŭ la poŝtejo en *Jeruzalemo* staras kelkaj kuracistoj k atendas leterojn el Eŭropo. Oni parolas pri la malbonaj negocoj k kion oni povus fari kontraŭ tio. "La homoj," diras unu el la kuracistoj, "ne povas legi. Ili ne kapablas deĉifri niajn tabulojn, ĉu ni skribas ilin hebree, arabe aŭ angle." "Kaj nun?", respondis alia. "Kion ni entreprenu?" "Mi jam ofte pripensis tion," denove diris la unua, "ni devas fiksi *gildosignojn* ĉe niaj domoj, kiel la gastejoj k frizejoj en Eŭropo. Vi ekzemple estas okulkuracisto. Vi elfenestrigos grandan *okulon*. Mi estas ortopedo, mi pendigos *piedon* antaŭ la pordon." "Kaj ĉu vi ne volas diri al mi, vi idioto," interrompis lin la tria, "kiu pagos por mi la polican punon?" Li estis specialisto por seksmalsanoj. *Trad. F. S. (16 462).*

[1] Registar-oficejaj.

Korektoj. En n-o 307 troviĝas sufiĉe multaj preseraroj. Kelkajn la leganto mem korektas senpene; tamen necesas indiki jenajn: Pĝ. 509 — en piednoto al la unua artik. legu "reakcia" (anst. redakcia); pĝ. 511 — dua kolono, linio 23-a de malsupre "sceno" (anst. scenco). La piednotoj sur pĝ. 512 estas komento de la *Redakcio*.

SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 18. — REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT. — Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstr. 22
Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12

Ĉar ĝis la 16-a de aŭg. mi ne ricevis ian sciigon pri re- aŭ neelekto de mia persono kiel redaktanto, mi tamen redaktas ankoraŭfoje (do lastfoje) ĉi tiun Paĝon. *Hu.*

LA DIA SENCO DE LA SENLABORECO

En la aprila kajero de la germanlingva gazeto "Der Rufer" (La Vokanto) eldonejo: Johannisbund-Verlag en Leutersdorf apud Rejno (Germanio) skribas la patro R o s e n b a c h, ordenmonaĥo de ordeno de la *Senmakula Virgulino* sub la surskribo *"Goja evangelio por la senlaboruloj"* interalie jenon: . . ." Sur la placoj k stratanguloj staras senlaboruloj. Ili faras nenion. Se oni demandas ilin, ili respondas: Ni estas senlaboraj, kion alian ni faru? Sed Kristo, kiu ĉiam estis sincera amiko de la mizeruloj, ĉu li estus kontenta per tia senkulpigo? Tute ne! Certe ankaŭ li elvokus veon pri la ordonemaj homoj, kiuj ne havas la necesan senton por la mizero de la malriĉuloj . . . sed Kristo ankaŭ mallaŭdus ĉi tiujn senlaborulojn k mallaboremulojn: "Kial vi staras maldiligente la tutan tagon?" La apostolo Paŭlo, kiu ne volis, ke la komunumoj zorgu pri li, iam diris: "Kiu ne volas labori, tiu ankaŭ ne manĝu!". Hodiaŭ li skribus en la sama senco: *"Kiu ne laboras, tiu preĝu! Sed kiu ne volas preĝi, ankaŭ ne manĝu, ĉar li neniel plenumas la de la kreinto donitan vivtaskon.* Tio ŝajnas al mi esti la profunda dia senco de la senlaboreco: havi pli da tempo por la supernaturo, havi pli da tempo por dio k por la animo, por preĝo k religia ago . . . Kiu por la popolkomuno ne laboras, tiu devas por la popolkomuno preĝi" —.

Preĝo anstataŭ pano. Tio estas la kristana socia bonfaro. Ĉu tio ne estas primokego de la senlaboruloj? Vere, tiaj fipastroj meritas, ke la ekscitita popolamaso linĉu ilin. *Hu.*

VESPERO ĈE "KULTURPIONIROJ"

Ni ŝatas tiajn memtravivaĵojn pli ol tradukojn de teoriaj artikoloj, ĉar estas ankaŭ nia tasko observadi la kontraŭulojn. Kunlaborantoj sekvu al tiu ekzemplo.

Pri religia movado en Svedio oni ne multon aŭdis sur nia paĝo. Eble vi al "nia" lando aljuĝas altan kulturon, k pro tio kredas, ke religiaj movadoj ĉe ni ne estas fortaj nek bone progresadas. Vi ankaŭ certe scias, ke ĉe ni la protestanta eklezio estas ligita al la sveda ŝtato. Tamen ni ne kredu, ke ne ekzistas religimovadoj subtenataj de la ŝtato. Ĉe ni estas diversaj religiulasocioj, ekzemple: baptistoj, savarmeo, pentekost-amikoj ktp. Por stultigado al homoj tiuj "kulturamikoj" harmonie kunlaboras k nun ni rakontos al vi pri lastatempa laŭŝajna sukceso de vek-predikanto, ĉu stultulo, ĉu ruza fripono, ni ne scias, kiu propagandas laŭ tute nova sistemo. Antaŭe tiaspecaj "Kulturpioniroj" agis en preĝejoj k inter siaj kredfratoj. La novaperinta vek-predikanto, Frank Mangs, tamen ne estas tiom humila, ĉar antaŭ kelkaj monatoj li nokte predikadis en kinoj, post prezentado de ordinara filmo. Tie li senpage donis sian venenon al la urba gejunularo, kiu plejparte konsistas el malriĉaj industrilaboristoj. Multaj junulinoj donis dum tiaj spektakloj sian "animon" al dio, ĉar la pastro estas tre belaspekta k juna. Post kelkmonata foresto nun tiu pastro revenis ĉi tien kun granda cirka tendo enhavanta sidlokojn por 1500 personoj. La tendon li bezonas, ĉar lia publiko estas tiom granda, ke ĉi tie mankas sufiĉe granda salonego. Nun tiu "pinto" opinias, ke li savos la animojn de ĉiuj loĝantoj de la urbo Boras, eĉ se ili, laŭ lia diro, troviĝas en la antaŭĉambro de l' infero.

La famo de tiu nova "Mesio" atingis la orelojn de ni ĉi-lokaj SAT-anoj, k hieraŭ vespere ni du direktis niajn paŝojn al lia tendo por ke ni ricevu "refreŝigon" en nia sklaveco. Kvankam ni alvenis duonan horon antaŭ la komenco de l' spektaklo, ni tamen devis aŭskulti la elverŝadon de l' "saĝo" de sur la ekstero de la tendo, ĉar ĝi jam estis plenplena je ĉielsoifantoj.

Fininte sian babilaĉon la pastro admonis ĉiun veran parencon al dio veni al posta kunveno en urban religiuldomon, ĉar tie la jamaj piuloj helpos al novevekiĝintaj rapide k senpene fortiri sian nigran animon for el la ungegoj de la diablo k enskribiĝi en la libro de l' ĉieluloj. Post ricevo de promeso pri tia avantaĝo, vi certe komprenas, ke la du mizeraj esp-istoj ne longe hezitis, sed tuj rapidis al la domo de la piuloj. Post kelkaj minutoj tiu salonego estis okupita k komenciĝis la plej granda frenezado ĝis nun de ni vidita. La publiko konsistanta el viroj k virinoj el ĉiuj klasoj k aĝoj momente ne sentis ian interklasan diferencon k laŭŝajne ankaŭ ne interseksan, ĉiuj estis egale frenezaj. Je ekkrio de la pastro ĉiuj sin ĵetis sur la plankon; komenciĝis plej teruraj preĝokrioj. Ni du estis la solaj sidantoj, k la pastro iradis tien k reen inter siaj ŝafoj elbuŝigante terurajn vortojn, el kiuj ni perceptis kelkajn, ekz. "sankta spirito, per viaj flugilbatoj fortimigu la diablon de la infero" ktp.

Subite la pastro alvenis nin k demandis: "Ĉu vi estas savitaj k ne plu loĝontoj de l' infero?" Ni respondis, ke ni ne rekonas alian animon ol nian racion, ni ne sentas inklinon freneziĝi k per tio esti duo pli inter via anaro. Poste ni proponis al li diskuti pri lia religio, sed imagu — la pastro saltkuris al la predikant-seĝo k ekkriegante, ke la diablo ĉeestas inter la ŝafidoj de dio, li forte instigis la piulojn preĝi por du fulmenigraj animoj reprezentantaj la varmegan fajron.

Nun estis por ni preskaŭ neeble nin deteni de kompato por la difavoratoj, ĉar ni klare vidis, ke ni troviĝas inter frenezuloj k kompatinduloj, kiuj, dank' al trompado k babiladaĉo de tiu pastro, tute perdis sian mensan ekvilibron. La komuna preĝado fariĝis pli k pli laŭta, ĉar krude la pastro pelis la homojn pli k pli proksimen al la rando de la frenez-abismo. Per siaj strangaj sonoj la preĝantoj memorigis nin pri brutarejo kun ĝia malhoma blekado. Al ni venis piuloj volantaj savi niajn animojn. Dum interparolo kun tiuj evidentiĝis, ke ne granda k valora estas ilia klero. Dogmoj, stultoj k fabeloj el biblio estis ilia sola argumentado. Laste alvenis nin konstrulaboristo, kiu opiniis sia devo savi la du samklasanojn. Tuj ĉe la komenco de nia interparolo ni atentigis lin pri lia devo: anstataŭ esti inter tiuj ĉi mensomalsanuloj labori por plibonigi la realan vivon surteran.

Li tamen ne volis konsenti kun ni, k li klarigis pri ĉio en la ĉielo k postmorta vivo. Li ankaŭ certigis, ke ni iam staros antaŭ dio, k en tiu kunveno partoprenos ĉiu mortinto. Nun ni ne povis deteni nin de mokrido k petis, ke li sciigu nin pri la lingvo uzota en la ĉielo, ĉar kompreneble oni tie inter tiom da diverslingvanoj parolos ian universalan interĉielulan lingvon. Je tiu nia demando li senresponde malaperis inter la preĝantaron.

Sur la predikanta seĝo la pastro plendis pro ĉeesto de nesaveblaj pekuloj k ricevinte jam sufiĉan bildon pri la stato de religiuloj ni stariĝis por foriri. Interŝanĝinte kelkajn vortojn en esperanto, ni hazarde ekrigardis la vizaĝon de sidantino sur sama benko kun ni k vidis, ke ĝi heliĝas, sed denove akceptas poste malesperan

TRA ESPERANTIO

LABORISTA ESPERANTISMO KAJ POLITIKO

Ĉu en nia movado ankaŭ estu politiko? Ĉu ni interesiĝu, ĉu ni nin okupu pri publika vivo, pri kunvivo de homoj k ĝiaj kaŭzoj k kondiĉoj?

Ni ne nur lernas k instruas esperanton, por ke la laboristaro scipovu paroli novan lingvon. Ni la lingvon volas uzi kiel rimedon, kiel ilon. Nia celo estas la celo de l' tutlaboristaro. Socialismo, senklasa sociordo! Ne nur en unu parto, sed en la tuta mondo regu la justo!

Fondi, krei unu grandan ŝtaton de l' mondo, kie la homoj vivas hominde, laŭjuste, tion ni volas, k por tiu ĉi estonto ni bezonas unu popolon. Signo de l' popolo estas la lingvo. Tial necesas, krei k disvastigi vivan lingvon. Niaj kontraŭuloj politikaj defendas firme la nacian lingvon. Ekzemple la ĉeĥa revolucio k ŝtatfondo estas sekvo de l' novkreo de la ĉeĥa lingvo k literaturo. — Ni konstruu tiun ĉi bazon por la mondproleta venko!

Sed ne nur por la estonta ŝtato ni bezonas la bazan lingvon, ankaŭ jam por la konstruado, por la komuna agado k batalo ni bezonas ĝin kiel ligilon de l' ruĝa mondarmeo.

Nun ni rigardu nian laboristan esperantistan laboron! Ĉu ni povas paroli pri sukceso, pri bona organizado k bona funkciado? Eta jes k ega ne, k kompare kun la kontraŭa naciburĝa movado: la sukcesoŝancoj estas je la flanko de naciistoj, malgraŭ la marksistaj profetaĵoj.

La kontraŭa ideo havas homojn, dediĉantajn sin kun siaj tutaj fortoj al la movado, serioze laborantajn ĉiam k ĉie por ĝi. Se ni volas sukcesi, venki, nia eduklaboro ne nur estu pure lingva, sed ankaŭ politika!

La unua paŝo estu la edukado al precizo, al akurato. Ni komencu ĉiujn farotaĵojn akurate je la fiksita horo, por ke ni ne malŝparu tempon, ni ne ekspluatu la K-dojn k akiru la konfidon de la laboristoj kunbatalontaj. Ankaŭ tuta nia agado estu preciza k akurata.

Komunan laboron ni lernu. Komuneco signifas iri unu kun la alia al unu sama celo. Tre malfacile, jes. Sed rigardu la kontraŭulojn. Ni lernu kunlabori malgraŭ antipatioj.

Ni kamarade kritiku. Kiam ni rimarkas, ke nia sistemo demokrataparlamenta nin ne helpas, nu, ni forjetu ĝin, k prenu alian, gvidsistemon, eĉ diktatoran, ĝin provu (prirespondece). Ni vere sincere lernu serĉi, provi k trovi la vojon al nia celo, ankaŭ ni ne forgesu la novajn ne larĝ-paŝitajn vojojn malagrablajn.

Se ni lernis bonan kunlaboron sukcesplenan en nia movado, unue en niaj grupoj, poste ni povas montri nian laboron, nian metodon al la aliaj organizoj, por ke la tutlaborista movado sukcesu.

Ni ne estu malantaŭe en la publika vivo, nur malgranda sensignifa laborist-asocieto; antaŭe en la unuaj vicoj de l' pioniroj, de l' preparantoj de nova viv- k sociordo estu nia loko.

Mor (14 624).

La 2-a k 3-a kajero de

Sennacieca Pedagogia Revuo

48 k 36 paĝoj

aperis. Geinstruistoj, pedagogoj, gepatroj, ankaŭ studentoj k liberpensuloj, abonu tiun dokumentoriĉan Revuon de SAT (jarabono: ½ dolaro usona), aŭ aĉetu la unuopajn numerojn po **0,45 mk. g.**

ADMINISTRACIO DE SAT, COLMSTRATO 1 LEIPZIG O 27.

aspekton. Ni bone ŝin komprenis. Aŭdinte nin paroli esperante, ŝi ekpensis, ke fine la spirito venis ankaŭ al ni, ĉar ni komencis paroli per fremdaj langoj.

Troviĝante ekstere sur la strato k enspirante malvarmetan freŝan noktaeron, ni kune ne kredas la fakton, ke ni vivas en la dudeka jarcento kun ĝia granda evoluo de tekniko k sciencо, sed la profundo de l' homo estas malluma pro stultiga superstiĉo. Ni ankaŭ miris, ke la loka lab. gazeto (socialdemokrata) tute prisilentas movadon, kiu vesperon post vespero altiras novajn viktimojn k dormigas ilian intelekton per ĉionsufoka malklero.

Tiel okazas en jaro 1930 en nia "alte kulturita" lando Svedio.

Ekström (12 439), Rask (12 949).

Ni laboras

Esp. kursojn aranĝas Asocio de Proletaj Liberpensuloj en Berlino k Asocio de Proletaj Liberpensuloj, Okcident-Saksio (speciale por funkciuloj). La lastnomita organizo multobligis k dissendis al 54 lokaj grupoj kun ĉ. 11 000 membroj la de K-do Viktorov-Ĉeĥoviĉ el Kiev ricevitan leteron kun temo "Kiel ni kontraŭbatalas dion". En kelkaj grupoj oni laŭtlegis ĝin en la kunvenoj. K-doj helpu pligrandigi ĉi rubrikon "Ni laboras" informante nin pri la utiligo de esp. en nia movado.

INTER NI

Ĉu denove?...

Se mi i n t e r n i u m a s, kelkiuj malkontentas pro miaj herezaĵoj. Se mi silentas, aliuj ĉagrenas. Laŭ instigo de ĉi lastaj mi rekomencas la babiladon kun la nura celo ne tedi la legantojn. Kredeble mi pikos ĉi tiun aŭ tiun, pinĉetos aliun k eble malkontentigos ĉiujn. Ĉu gravas, se almenaŭ mi tedos neniun?...

Mi ne volas trudi miajn pensojn, ne celas starigi novan filozofian sistemon. Necesas por tio esti pli grandcerba ol mi estas. Cetere ĉiu klera homo bone scias, ke neniu filozofia sistemo povis ĝis nun trovi unuaniman akcepton: ĉiuj estas tre diskuteblaj k diskutataj sen ia praktika rezulto ol tiu, ke la diskutantoj tenas vigla k bone funkcianta sian pensaparaton.

SAT difinis al si kiel taskon klerigi, eduki, kulturi siajn anojn. Sekve estas tute normale k dezirinde, ke la SAT-anoj penadu akiri memstaran penskapablon. Cerba gimnastikado estas tiucele necesa.

* * *

Oni povas pli malpli kontentige klarigi al si la naskiĝon de ideoj per la materialisma filozofio. Ilia evoluado k la fakto, ke ili postvivas la kaŭzojn, kiuj naskis ilin, ŝajnas al mi malpli facile klarigebla. Kial ekzistas malsamaj religioj en samaj loko, tempo, vivkondiĉoj k cirkonstancoj?

Farante tiun demandon, mi pensas pri la mahometanoj k hinduoj en Hindio. La unuaj ja mortigas bovinojn por manĝi ilin k la duaj, kiuj konsideras sanktaj tiujn laktodonantajn bestojn, kelkfoje ... mortigas mahometanojn ĝuste pro ilia mortigemo al bovinoj...

La ideoj estas grandaj fortoj. Kiam homoj mortas k mortigas por konservi sian naciecon, sian lingvon, sian apartan vivmanieron k. s., ilin instigas al tio ideoj. Se la marksismo fariĝus nova religio tiom altirpova por la laboristaj amasoj, ke ĝi kolektus ilin milionope en ĉiuj landoj, la socialismo povus eble esti konstruata eĉ se la historia materialismo ne estas senmanke fundamentita.

Kiam komunisto-laboristo k socialisto-laboristo interbatalas, ilin instigas ideoj. Ĉe tia konstato oni iafoje volus detrui la ideojn. Neeble. La homo estas animalo, kiu havas ideojn. Por detrui ideojn oni devas detrui la cerbojn, kiuj entenas ilin.

Sola solvo al tia problemo estas, ke la homoj akiru ĝustan komprenon pri la relativa valoro de ideoj k ne konsentu morti aŭ mortigi pro ili.

Sed kiam laboristoj batalas por akiri pli bonajn labor- k vivkondiĉojn, tiam ili ne batalas pró ideoj. Pli alta salajro, pli mallonga labortempo — tio estas konkretaĵo. La klasbatalo estas fakto, ne ia ideologio.

En la Ajnŝtejna (E i n s t e i n-a) epoko la relativismo eniris eĉ la kampon de la t. n. ekzaktaj sciencoj. Ĉu ne estas dezirinde, ke ĝi ankaŭ eniru en SAT? Mi opinias, ke jes. Kaj se tiel okazos, la kamaradeca kunlaborado inter SAT-anoj kun malsamaj politikaj konvinkoj, sed samaj interesoj povas funkcii glate aŭ almenaŭ sen tro fortaj interpuŝiĝoj.

Tiel estu! . . .

Edinburgo, 15. aŭgusto 1930. *E. L.*

LA SURDULOJ, KIUJ LERNAS MUZIKI

Jam kelkfoje oni tute prave atentigis, ke propagandi sennaciismon al neesperantistoj estas samrezulte, kiel instrui muzikon al surduloj aŭ pentrarton al blinduloj[1]. Tamen el la malsupre citata fakto evidentas, ke tia propagando ekzistas.

Ukrainlingva ĵurnalo "Proletara Vero" publikigis en formo de artikolo sub la titolo "Ĉu esperantigo aŭ ukrainigo" paroladon de popola komisaro por klerigo en Ukraino, K-do Skripnik, faritan de li antaŭ sindikata aktivularo en Stalino. Pri esenco de laborista esperantismo li havas tian komprenon: "En iaj rondoj de esperantistoj estas antaŭ ĉio ia teorio pri sennaciismo, kiu tekstas jene: Internaciismo estas unuavice liberiĝo el naciaj lingvoj, studo de sola internacia lingvo esperanto. Oni devas anstataŭ nacia kulturo estigi superan kulturon de internaciismo, nome anacionalismon, sennaciismon, kulturon de esperanto." Tial li opinias, ke esperantistoj[2] estas kontraŭ studo de la lingvoj, aparte kontraŭ la ukraina, k propagando de esperanto devas malhelpi al plenumo de komunista programo pri nacia politiko, al kreskigo de ukrainlingva kulturo en Ukraino. Li miras, kiel junkomunistoj povas partopreni tian kontraŭan al partia programo idearon. Li kvalifikas esperantan sennaciismon, kiel etburĝan opozicion kontraŭ komunista nacia politiko.

Tamen K-do Skripnik rekonas ian praktikan valoron al esperanto: "Mi mem ne parolas esperanton k certe ne lernos ĝin, sed mi povis konvinkiĝi, ke esperanto havas ian signifon. Mi aŭskultis raporton . . ., kiel okazas informo al eksterlando pri kultura stato de Ukraino. Montriĝis, ke tre multaj informoj iras per eldonata en Ĥarkovo esperanta gazeto". Kaj plue: "Kiam temas pri la lingvo, kiu povas esti ia kultura interligilo por nia lando kun esperantistoj de aliaj landoj, kiu povas esti informilo ktp., tian limigitan signifon, kvankam sufiĉe gravan, oni devas konstati pri esperanto."

Nu, tia takso pri lingvo internacia, kiel pri diskonigilo de ukraina kulturo, estas iom "limigita" por komunisto, tion diri povus ajna ukraina ŝovinisto. Ni jam kutimis al suprajaj juĝoj pri nia movado fare de laboristaj gvidantoj k plu ni ne miras k ne indignas: finfine ili ankaŭ studos esperanton postsekvante la amasojn. Sed nun ne pri tio temas, temas pri tio, ke K-do Skripnik estas muzikanta surdulo, aŭ al li mispropagandis aliaj surduloj. Ĉar interalie li diris, ke vizitinta lin k pledinta por esperanto *reprezentanto* de Stalina SEU-organizo scipovis paroli nek ukraine, *nek esperante* (!), sed nur ruse. Do, la sennaciismon oni povas sen miskomprenoj propagandi nur esperante inter esperantistoj.

Grodnano.

ĈIRKAŬ NIA DEKA

Nur per kelkaj vortoj mi volas protesti kontraŭ la agado de tiuj K-doj, kiuj ĉeestis la Kongreson, sed ne partoprenis la laborkunsidojn, ĉar dum tiuj montriĝis, ke el la 340 partoprenantoj nur ĉ. 200 ĉeestis la laborkunsidojn[1]. Ĝenerale la SAT-anoj riproĉas tute prave tiujn K-dojn, kiuj samtempe estas membro de UEA k partoprenas ties kongreson. Sed, ĉu decas al bona SAT-ano, ke li nur laŭdire partoprenas la Kongreson k uzas la okazon por loĝi k manĝi malmultekoste k tiel rigardi la urbon? Laŭ mi, la Kongreskomitato ne estas ia vojaĝ-oficejo.

K-dino 16 599.

[1] K-do Lanti diras en "La Lab. Esperantismo" (p. 30: "Ili (t. e. la sennaciistoj) opinias, ke propagandi sennaciismon al malsamlingvanoj estus same malsaĝe kiel instrui beletristikon al analfabetoj".

[2] Tia bedaŭrinda konfuzo rezultas ĉefe el tio, ke kelkiuj provas samigi la du terminojn: *internaciismo* k *sennaciismo*. Necesas do ĉiokaze deklari, unu fojon pli, ke SAT ne havas kiel celon propagandi sennaciismon. Se tiel estus, ĝi devus nomiĝi: *Sennaciisma* Asocio Tutmonda k ĝia oficiala organo: *Sennaciisto*, ne "Sennaciulo". Aliam ni eble klarigos pli detale la aferon; dume ni ripetu, ke la sennaciistaj SAT-anoj ne celas sennaciistigi nian Asocion. — *E. L.*

[1] La K-dino principe pravas k supra riproĉo trafas multajn; tamen, por esti justaj, ni rimarkigu, ke ioma parto el la kongrespartoprenintoj, kiuj estas Londonanoj, povis ĉeesti nur la dimanĉajn arangôjn k la du unuajn laborkunsidojn, kiuj okazis lundon — festotago en Britio — k estis devigataj pro sia laboro foresti la kunsidojn de l' sekvantaj tagoj. — *Red.*

La plej bona k amuza legolibro estas

KANDID

La ĉefverko de

VOLTER

en la esperanta traduko de

E. Lanti

kun antaŭparolo de l' tradukinto k ilustroj de

R. Bartelmes

Laŭ la unuanima opinio de la recenzistaro la stilo estas modela, simpla, facillegebla.

Form. 13×19 cm. 160 pĝ.

Prezo 1.70 mk. g., bindita 3.— mk. g.

Mendu tuj ĉe Administracio de SAT, Colmstr. 1, **Leipzig O 27.**

TRA LA MOVADO

KRONIKO

ĈEĤOSLOVAKIO. Distrikta komitato de socdem. junularo en Stankov, okcidenta Bohemio, okazigis je 20. 7. en proksima vilaĝo Puclice internacian tagon de gejunularo, kiun partoprenis ĉeĥaj k germ. K-doj el vasta ĉirkaŭo. Antaŭ pli ol 300 ĉeestintoj, inter kiuj proks. 20 geesp-istoj, K-do Ŝtekl salutis esp-e k propagandis ĉeĥlingve pri la signifo de esp-o. Samon faris K-do Kamerer germanlingve. Tiu aplaŭdita elpaŝo estis la unua en tiu regiono, pruvo, ke esp-o komencas penetri en la vilaĝojn, kiuj longe obstinas por akcepti ion, kion oni ne tuj povas utiligi. (6082.) — *SOVETIO.* Kieva SEU-organizo nun havas 98 anojn. Plej grandaj atingoj estas inter junkomunistoj, pro rezolucio de Distrikta komitato iniciati laboron. En la gazetoj aperis la necesaj kritikoj. La Intersindikata Domo aranĝis specialan oficejon por internacia propagando, preskaŭ je 50% partoprenatan de esp-istoj. Je 3. 5. okazis internacia vespero kun ekspozicio. Sekve okazis nova kurso (8. 7.). Pedologia katedro de Kieva popolkleriga instituto organizis specialan esp. kurson en lernejo por studi edukan valoron de esp. Ĝi kolektis interesegan materialon per esp. korespondado. Tutukraina Muzea urbeto sukcese aplikas esp-on por interrilati kun liberpensuloj. (728.)

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Prof. L. Ĵirkov, Kial venkis esperanto. Eld. CK SEU, Moskvo. 1930. Eldonkv. 3000. 36 pĝ. Form. 12×17. Prezo 20 kop.

Ruslingva broŝuro pri la superecoj de esp-o kompare kun volapük k ido.

Juneco k Amo. Legendo el *Venecio.* Verkita de *Edw. S. Payson.* 1930. Eld. The Esperanto Publishing Company, Ltd., *London WC 1.* Havebla ĉe British Esp. Association, 142, High Holborn, *London WC 1.* 72 pĝ. Form. 10×16. Prezo broŝ. 1,3 ŝil., bind. 2,6 ŝil.

La konata temo pri du amikoj, kiuj enamiĝas la saman virinon. La rakonto estas verkita sen granda originaleco, sed en flua, bonstila k senerara

esperanta lingvo. Mi trovis nur unu nekonatan vorton: gabloj (Sceno II). Teknika manko estas, neimitinda laŭ mi, ke la paĝoj estas nenumeritaj.

N. B.

G. Gladstone Solomon, Esperanto por Infanoj. Eld. The British Esp. Publishing Company Ltd., 142, High Holborn, *London W. C. 1.* Form. 15×21 cm. 69 pĝ. Prezo: 1 ŝil. 6 p.

La aŭtoro, kiu verkis similajn librojn por franc-, german-, angla lingvaj infanoj, tre bone solvis la malfacilan taskon prezenti simplan, allogan k interesan lernolibron laŭ rekta metodo por esp. infanoj. La metodo aplikita estas tre taŭga por junaj lernantoj de nia lingvo k la desegnoj sendube plezurigos ilin. Ankaŭ papero k preso estas belaj.

Gvidlibro pri Stockholm. Eld. Esperanta Turisto Komisiono, *Stockholm*, Malmtorgsgatan 5. — 16-paĝa bele ilustrita libreto kun koncizaj, sed precizaj sciigoj por la vojaĝanto.

KORESPONDADO

AŬSTRIO

— Kiuj eksterl. Gek-doj sendas al mi PI, il. gaz.? Adr.: K-do Ernst Winkler, *Kematen b. Wels.*

— Kiuj eksterl. Gek-doj sendas al mi PI, il. gaz.? Adr.: K-do Karl Humer, *Kematen b. Wels, 2.*

FINNLANDO

K-do Waino Hellsten, *Loimaa* (Suomi), interŝ. PM, f-aĵoi, il. g. (nur bonajn markojn) kĉl, cer resp., ruĝaj krucmarkoj.

FRANCIO

— Kiu K-do povas havigi al mi let. kurson presitan en germ. lingvo? Adr.: K-do Jean Wutte, *Schiltigheim,* Bas Rhin.

GERMANIO

— Kelkaj K-doj koresp. kĉl, L, PI, PM. Skribu al K-do Gerhard Gumpert, Leipziger Str. 26, *Görlitz*/Schlesien.

K-do Walter Blankschein, Parkstr. 15, *Riesa*/Elbe, kĉl, PI, PM, koresp. pri alumet-industrio.

K-do Fritz Glatte, Nieder-Hof, *Lomnitz,* Kr. Hirschberg/Rsgb., kĉl, pri ĉ. temoj, L, PK.

— K-doj sendu gazetojn, afiŝojn ktp. por nia ekspozicio! Mi sendos rekompence germanaĵojn. Adr.: K-do Alfred Obst, Walterstr. 2, *Hirschberg*/Rsgb.

HUNGARIO

K-dino Gizelo Müller, Szent Marton str. 17, *Szombathely,* L, PI, kĉl.

K-do Stefano Fábián, Munkácsi str. 17 (Szöllös), *Szombathely,* PM, kĉl.

KANADO

Adresŝanĝo. — K-do Alick Black (antaŭe Camp 9, Englewood, B. C.) havas nun jenan adr.: Box 39, *New Westminster, B. C.*

SOVETIO

K-do Eugen Melnik, Pokrovka 31, stud. loĝejo, *Moskvo,* kĉl, PI, bfl., peras gekoresp-tojn, menciu gradon de esp. scio. Resp. gar. 12 874.

K-do E. Melnik, Pokrovka 31, studenta loĝejo, *Moskvo,* bezonas adresojn el ĉl. por si k siaj kursanoj. Skribu amase: L, PI, bfl, gaz. Ĵuskomencantoj ne timu skribi! Vi havos egalan K-d(in)on. Nepre menciu, kiu vi estas.

— Viglan korespondadon garantias 150 gestudentoj pri ĉ. t. kĉl. Adr.: Ukrainio, *Kremenĉug,* Pedagogia Teknikumo.

Vizitu nin! Vizitu nin!

Dum nia Ruhr-regiona LEA-distriktkonferenco

en Duisburg, je la 28-a de septembro. Ni elektis Duisburg tial kiel konferenclokon, ĉar ĝi pleje situas okcidente. Pro tio ni esperas, ke holandaj k belgiaj Gek-doj vizitos nin multnombre. Pri ĉiuj detaloj turnu vin al K-do Jakob Müller, *Duisburg - Hochfeld,* Immendal 59, Germanio.

NATURAMIKOJ

Sport- k Kulturkongreso okazos je 4.—5. okt. en Köln-Mülheim, aranĝata de Naturamikoj! Ĉiuj prol. Sport- k Kulturorganizoj nepre partoprenu sendante delegiton. Ankaŭ unuopuloj partoprenu. Senpaga loĝejo estas garantiata. Se almenaŭ nur 2 alilandaj Gek-doj partoprenos, la kongreslingvoj estos germana k *esperanta.* Anoncojn k salutskribojn sendu al: Naturfreunde, Lokal Richter, Oskarplatz, *Köln - Mülheim,* Germanio.

Atentigo! K-doj metu sur siaj leteroj al la Redakcio ĉiam siajn nomon k adreson!

Rondo de SAT-anoj

en Bournemouth k Christchurch dez. ricevi el ĉ. l. bonajn afiŝojn laboristajn, por ekspozicio en la 1. aŭ 2. sabato de oktobro, por montri kiel oni utiligas afiŝojn por la propagando de socialismo, kulturo, ktp. Materialon ni pretas tuj poste sendi, laŭ deziresprimo, al rondo en Leipzig. Adr.: K-dino M. Upsdale, "Melcombe", Portfield Road, *Christchurch,* (Hants.), Anglio.

Helpu al ni, por ke sukcesu la unua ekspozicio en nia loko dum 10. ĝis 12. okt. per AFIŜOJ varbaj en esperanto k nacilingvo, nacilingvaj diverscelaj laboristaj flugfolioj (kun esp. klarigoj). GAZETOJ k nacilingvaj esp. gazetoj (LEA), nacilingvaj lab. k il. gazetoj (klarigoj esp.), *PK ilustr. M bfl. aŭ salutletero.* Respondon (rekompencon) ricevos ĉiu (laŭ sia deziro). Garantias K-doj 10 202, 12 014, 10 201. Adreso: Franz Kunze (por ekspozicio), *Neustadt a. Tafelfichte,* Hirteng. 235, Nordbohemio, Ĉeĥoslovakio

Esperantista Grupo

organizanta ekspozicion bezonas PI k afiŝojn (pri lab. movado), kĉl. Tekstoj tradukotaj esperanten. Resp. garantiata. — K-do Rouin, 16, rue J. Verne, *Villeneuve - Saint - Georges* (S-et-O), Francio.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Der Volkslehrer, Langensalza, 3. 8., Pri hist. rolo de esp. k SAT (300), *Aĥalgazrda Komunisti,* Tiflis (majo/junio), Trag. en usona mallib. (293), En lando de senlab. (288).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

The Plebs, London, aŭg. (La Lab. Esp.), Signalen, Stokh., 7. 8., *Le Réveil Ouvrier,* Nancy, 9. 8., *L'Effort,* Lyon, 9. 8., *Le Progrès,* Lyon, 11. 8., *L'Eclaireur de l'Ain,* Oynax, 3. 8., *Le Populaire,* Paris, 15. 8.

Pri SAT-Kongreso raportis:

Daily Worker, London, 4. 8., 6. 8., 8. 8., *Daily Herald,* Lond., 6. 8., *Monde,* Paris, 16. 8.

Peresper. materialon enpresis:

Aĥalgazrda Komunisti, Tiflis (majo/junio), Esp. Servo (6 art. el n-oj 288 ĝis 296).

JARABONO
por membroj . . . 8 mk. g.
por nemembroj . . 9 mk. g.
Ankaŭ ¼-jare abonebla!

NIA POŜTO

Al multaj. — Ni estis lastatempe bombardataj per artikoloj, ĝenerale polemikaj, pri nia monafero en Moskvo. Tian materialon ni ne publikigos, tial ke ĝi certe ne helpus trovi la ĝustan solvon al tiu problemo. — E. L.

Pro manko de loko ni ne povas enmeti interesan artikolon de K-do E. V. Ivnickij, per kiu li klarigas, ke lia "fantazia" rakonto iom post iom fariĝas realaĵo. Ni jam vaste reklamis la traktor-aferon k la legantoj devas ne forgesi, ke la kolektata mono devas esti sendata al nia Administranto en Leipzig, k ke tio helpas malgrandigi la ŝuldon de SEU al SAT.

15 428. — Dankon pro viaj skribaĵoj; neeble ilin enmeti. *Red.*

Brynowna. — Esp. verkoj de tiuj du verkistoj ne estas konataj al ni.

10 574. — Bedaŭrinde ni povas nun nenion sendi, ĉar la mono mankas.

Hellsten (Loimaa). — Simpla koresp. anonco kostas 0,80 mk. g., mankas 3 mk. fin. *Adm.*

ENHAVO

	pago
Sklaveco ĉe la antikvuloj	523—24
La karbministaro en Belgio	524—25
Sardujo.	525
Iom pri la vivo de senlaborulo	525—26
Aktiva helpo estas necesa!	526
Por nia distro	526
Sennaciula Liberpensula Paĝo	527—28
Tra Esperantio	528—30
Korespondado, Anoncoj	530

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)